

# LA VERDA LUPEO



## Informilo de ELF/AREK


Aŭgusto 2017

(49a jaro)

N-ro 175

*Esperanto Ligo Filatelista /Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj*

Redakcio: Rudolf Burmeister Max-Müller-Str. 86 DE 09123 CHEMNITZ



Ankaŭ ĉi-jare la Esperanto-klubo en la serbia Senta okazigis solenan kunvenon. Funkciis E-a poŝtstampo 23an de Junio 2017 en la loka poŝtejo kun la teksto

**KORMORANOJ ANKORAŬ NE REVENIS**



**Poŝta memorkarto el Pollando  
kun poŝta eldonstampo kaj ornama stampo de ekspozicio**

**Eldondato:** 12. 04. 2017

**Nominalo:** 2,60 PLN (A)

**Eldonkvanto:** 10 000, ofseta printo

**Mezuro:** 148x105 mm

**Aŭtoro:** R. Kostera

**Unuatagaj stampoj en:** Słupsk 12 kaj Białystok 1



**Informoj prenita el retejo de Pola Poŝto, Aprilo 2017, kaj sendita de s-ino Anna Laskowska el Krasnystaw, Pollando. Koran dankon al vi!**

**Esperanto-filatela ekspozicio en Białystok 2017, Aprilo, 12  
en la Esperanto-Centro Ludwik ZAMENHOF.  
okaze de la eldono de poŝta Zamenhofs memorkarto**

Pri ĝi ni eksciis hazarde pro serĉo de reklamo-pm el Kraĵowa.

Ni ne trovis rezulton sed valoran informon kun pluraj fotoj de ekspozicio okazinta sub la titolo „Esperanto en filatelo“.

Realigis ĝin per siaj kolektoj Franciska Skrypko kaj Mieczysława Marczaka.

Ambaŭ estas al ni ne konataj. Gratulon al il!

Sube foton el la ekspozicio kun al ni nekonata samideano.



Jen objekto ofertita en itala ebay... kun stranga dato 2018 06 09 el Kraĵowa...  
do el estonto! Ĝi havas bildon de la E-lernolibro

**UNIVERSALA ESPERANTO METODO**

Ni esperas ricevi klarigojn pri ĝi.



## La 100-a datreveno de la forpaso de L.L. Zamenhof

**Koreio, 8a de Aprilo 2017: Individua E-poŝtmarko**

**Nominalo: 0 won (eterna uzo)**

**Bildo: Portreto Zamenhof (ni/bla)**

**Eldonis: Korea Esperanto Asocio / Korea Poŝto**

**Eldonkvanto: 5020 pecoj:**

- 1) 606 pecoj en 101 folietoj kun po 6 ipm
- 2) 1414 pecoj en 101 folietoj kun po 14 ipm
- 3) 3000 pecoj en 150 folietoj kun po 20 ipm.

**Sendis informon kaj bildojn: Nia kluba amiko Kang Hongu**  
**Ni kore dankas al li!**





La folietoj kun po 6 kaj 14 ipm posedas „kuponon“ kun bildo de la senvualiga ceremonio de Zamenhof-busto en Bulonjo s.M. en jaro 2015.



Por la du-taga Kansaja Esperanto-kongreso en Toyonaka (3-4 junio 2017) aperis 8 personigitaj poŝmarkoj kun nominaloj de 62, 82 kaj 92 enoj. La kongresa desegnaĵo montras en blanka aŭ verda rondo krokodilon. Aperis ankaŭ memorkoverta, memorkarto kaj poŝta stampo.

**Kongresejo:** La halo de Universitato Oosaka [Oosaka Daigaku Kaikan]

**Kongresa Temo:** Esperanto en solidareco de mond-civitanoj

**Organizis:** Toyonaka Esperanto-Grupo, Esperanto-Rondo en urbo IKEDA



En la kongresejo funkciis dumkongresa poŝta giĉeto  
kun kongresa poŝtostampo (3 kaj 4 Junio 2017)



Aerpoŝte sendita kongresa koverto kun du kongresaj poŝtmarkoj

Jen la kompleta serio:



40x47, 82 enoj, kun blanka rondo,



40x47, 82 enoj, kun verda rondo,



32x38, 62 enoj, kun verda rondo,



32x38, 62 enoj, kun blanka rondo,



32x38, 82 enoj, kun blanka rondo,



32x38, 82 enoj, kun verda rondo,



32x50, 82 enoj, kun blanka rondo,



32x50, 92 enoj, kun verda rondo.

Koran dankon al niaj Ziro SUZUOKI kaj Haruja MAEKAŬA  
pro la senditaj informoj!



glumarko




Por la kongreso aperis glumarkoj, ipm kaj bildkarto.  
Detalojn vi trovos en nia decembra LVL.

Danke al la ekvido de bildkarto kun desegnaĵo de „K.K.“ pri heroa Esperantisto kun halebarda E-flago, skribita de nia fama Marie Hankel, mi serĉis tiun karton en la Davidov-katalogo de 1911. Kaj trovis ĝin tie! Jam antaŭ pli ol 25 jaroj mi en la hejmo de Detlev Blanke povis kopii tiun katalogon, kaj antaŭ jam pli ol 30 jaroj nia Jean Amoureux sendis kopiojn pri pluraj Davidov-ekslibrisoj. Eĉ Davidov-foto videblis en tiu kopio.

Tiu katalogo notas pli ol 400 bildkartojn, aperintaj ĝis 1911 kaj krome ankaŭ sigelmalkojn kaj fotojn... riĉfonto por ĉiu nuntempa kolektanto.





*Tia g. Davidov*



Jen 2 el pluraj Davidov-ekslibrisoj, kiujn montri al vi eblas danke al la helpo de nia Jean Amoureux.

Spuroj pri Davidov ankaŭ foje troveblas en ret-aŭkcioj, ekz. pri Davidov-glumarkoj kaj en Vikipedio kun Davidov-poŝtkarto, bedaŭrinde en plorinda kvalito. Tamen tre interesa!





**La fama Davidov-katalogo  
el la jaro 1911**



Nekonata Esperantistino,  
sed fama artistino  
*Johanna Katharina*  
**KRABBES**  
(1881-1970, Dresden)


Mi eksciis pri ŝi  
per poŝtkarto  
skribita de M. Hankel

La grafikistino  
apartenis al la  
„Artista kulturrondo  
Loschwitz“

La apuda karto  
fontas el la jaro 1909!

En ĝia dekstra subo  
la inicialoj KK  
(por: Katharina Krabbes)






## Volapukaĵoj

Jen vp-a ekslibriso de  
**EDWIN DAVIS FRENCH**  
 el la jaro 1893 kun la teksto  
**SE BUKS VOLAPÜKIK**  
**E VAPÜKIK**  
 Supre la volapuka blazono  
 kun la slogano  
**MENAD BAL PÜK BAL**  
 Sube notita: 1893 kaj EDS sc



Volapuka sesbloko de 1 Franazim-marko

Parte eĉ nedentumita! Unuafoje mi vidis tian markon en folioparto en azia aŭkcio. Havebla kontraŭ Honkongaj dolaroj... se oni kapablus ĝiri monon per la reto. Sed mankas (al mi) eĉ scio, kiom estas la kurzo.



Jen la aŭtoro de la planlingvo *Mundelingva*: Johano HUMMLER. La artikoleton pri li en Vikipedio per ĉi bildkarto nun bildigis nia amiko J R Piton. Antaŭ nelonge li povis meti la karton en sian kolekton. *Mundelingvo, Mundelingua aŭ Mundelingva estas planlingvo aposteriora, okcidenteŭropa (euroklono), proponita en 1904 de Hummler. Eble ĝi estas bazita sur latina lingvo. La frapfrazo por la lingvo estis: Homite uno - Lingva uno (kiel la konata Volapuka devizo: Unu homaro, unu lingvo).*

*La projekto ricevis la bibliotekan klasifikon 418 "1904" de Biblioteko Butler.*

- *Nombroj (1-10) uno duo trio karo kino seto sito oto novo deko*
- *Ekzempletoj: Ego hava ame. (Mi estis aminto) Ero e va ame. (Li amis)*

Fonto: Vikipedio



### **Honormedalo „80 jaroj Bulgara Esperanto-Asocio 1907-1987“**

Nia Hans Jankowski metis en sia medal-katalogo de 1989 noton pri aperinta memormedalo en Bulgario. Al li mankis detaloj pri la aspekto. Li informis, ke la prezidanto de BEA, Petar Todorov, en solena festo okaze de la 80-jara jubileo de BEA, transdonis jubilean medalon al honor-membroj de BEA. Finfine en jaro 2017 tiu medalo videblis en ret-aŭkcio kun bildo de averso kaj reverso. La averso montras portreton de Zamenhof kun la jarciferoj 1859-1917, kaj la reverso la noton: 1887-1987 ESPERANTO, kaj: 1907-1987 BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO. La medalo aperis en bronzo kaj (?) oro. Medalisto, mezuro kaj pezo ne konataj.



## Tutmonda Filatela Ekspozicio kun Esperanto-ekspoziaĵo Oktobro 2017 en Brazilo

Nia kluba amiko James Rezende Piton decidis partopreni per kolekto de Esperanto-bildkartoj, jam aliĝis kaj komencis konstrui la ekspoziaĵon sur tri paneloj

### Pelas Terras das Línguas Plançjadas

„Tra la lando de planlingvoj“

Jen la strukturo:

Legendo Babel

Menade Bal – Püki Bal = Volapük

Lingvo Internacia = Esperanto

L.L. Zamenhof

La gramatiko

Organizoj – Klerigado

La lingvo

En praktiko


Aliaj planlingvoj

Resumo



E-bildkarto „Esperanta ekspozicio en St. Omer, 1903“

**La 100-a datreveno de la forpaso de L.L. Zamenhof**  
**110 jaroj Esperanto en Bydgoszcz (1908 – 2018)**  
**130 jaroj Esperanto**



**Aperis ipm, apudstampo  
 kaj poŝtkarto.  
 Informoj trovitaj en retejo  
 de fervojista filatela sekcio  
 en Bydgoszcz.  
 Detalojn vi trovos  
 en nia decembra LVL**



# ELF-AREK

*Esperanto-Ligo Filatelista*

*Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj*

**Prezidantino:**

S-ino Elda Doerfler

Via Ghirlandaio 18/1

IT-34138 TRIESTE

>[testudo.ts@gmail.com](mailto:testudo.ts@gmail.com)<

**Jen mia bankokonto:**

IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta

BIC: BPPIITRRXXX.

Por: Elda Doerfler

UEA-konto: ELF/AREK = Kodo: elfx/r

Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00

Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti nian prezidantinon.



Eldonita de PO Bydgoszcz en Aprilo 2017

Eldonkvanto: 300

Aŭtoroj: Z. Wilczek, W. Kawinsky